Bijvoegsel bij Esperanto-Panorama 3/75

Annexe à Esperanto en Marche 3/75

## LOĜADO

1) Ĉe PRIVATULOJ

La organizantoj provos trovi kiom eble plej multe da privatuloj (esperantistoj) kiuj pretas gasti vin. Ili proponas jenan favoran eblecon :

> TUTA SEMAJNFINO
> 1.000 fr. por individuo
> 800 fr. por infano aŭ studento
> por aliĝoj, lunĉo, varma vespermanĝo (sabate), balkarto, tranoktado, matenmanĝo, aŭtoĉarekskurso kaj varma tagmanĝo.

Pro la tre limigita nombro vi skribu baldaŭ al
Veerle HÜWELS, Kattenstr. 46,
2670 Oppuurs.
Nur post sciigo ke iu povos akcepti vin, vi pagu la necesan sumon al Veerle HÜWELS, Pĉk. n-ro 000-1121121-92.

2) En HOTELO

Ni proponas al vi mem kontakti la hotelon BILLARD PALACE, Koningin Astridplein 40, Antwerpen (tel. 031/33.44.55), la hotelo en kiu okazos la balo.
Prezoj por 1 tranoktado kun matenmanĝo kaj taksoj :

| | |
|---|---|
| 1 persona ĉambro sen banejo | 335 fr. |
| 1 persona ĉambro kun banejo ekde | 600 fr. |
| 2 persona ĉambro sen banejo | 570 fr. |
| | k.t.p. |

Fotoj kaj kliŝoj

estas afable disponigitaj

de la Servo por Turismo,

Suikerrui, Antwerpen,

kiu ĉiam informos vin

per Esperanto-materialo.

Bonvolu skibi kaj peti pri tio.



# ESPERANTO TAGOJ ANTWERPEN

5, 6, 7 sept. 1975



LA CELO DE LA ESPERANTO-TAGOJ ESTAS MONTRI AL LA PUBLIKO LA EKZISTON KAJ LA PRAKTIKAN UZADON DE LA UNIVERSALA LINGVO.

TIAL ELLABORIĜIS PROGRAMO ĜUEBLA POR ĜIUJ, KIU KROME CELAS VEKI INTERESIĜON DE LA AMASKOMUNIKILOJ. BONA OKAZO DO POR KUNVENIGI VIAJN PARENCOJN KAJ GEAMIKOJN.

LA VENDREDA KAJ SABATA PROGRAMOJ OKAZOS EN MODERNA FESTSALONO EN BUTIKA STRATO DE LA URBOCENTRO. DIMANĈE OKAZOS EKSKURSO AL TRE VIZITATA BIENO.

VI ĜUOS ENTUZIASMIGAN ARANĜON, KIES FESTPAROLADO, ENKONDUKOJ, KUNLIGAJ TEKSTOJ K.T.P. ESTOS EN ESPERANTO.

ALIĜU TUJ ; LA ESPERANTO-TAGOJ ESTOS NEFORGESEBLAJ !

## PROGRAMO

**Vendredo**, 5.9.75 : je la 20 h. en la festsalono, Quellinstr. 31, Antwerpen : DIAPOZITIVOJ kaj FILMO pri ANTWERPEN

**Sabato**, 6.9.75 : en la festsalono, Quellinstr. 31, Antwerpen :

10-a horo : FESTPAROLADO fare de IVO DURWAEL, prezidanto
KLASIKA KONCERTO de JUNAJ ESPERANTISTOJ

12-a horo : KOMUNA LUNĈO[1]

14-a horo : DEMONSTRACIO de METIARTOJ en la granda halo : puntfarado, ŝpinado, teksado, skulptado, keramiko, desegnado.
LIBRO- kaj DISKO-BUDOJ kun ebleco aùdi Esperanto-diskojn kaj radio-elsendojn.

15a horo : PAM-POM-PARADO
VARIA PROGRAMO kun orkestro, koreografio, iluziisto, pantomimo, kantado k.t.p.

18-a horo : komuna vespermanĝo[1]

19.30-a horo : DISERVO en la preĝejo de Ossenmarkt.

X 20.30-a horo : BALO, Billard Palace, Astridplein 40, Antwerpen.

**Dimanĉo**, 7.9.1975 : AùTOĈAR-EKSKURSO al Kelchterhoef kaj Hengelhoef.

- foriro je la 8.45-a horo en Mortsel ĉe la komunuma domo
- eblecoj por eniri la buson je Luythagen, Berchem (policejo), Billard Palace, Turnhoutse Baan (Kerkstr., Eliaertstr. kaj kinejo Roma)
- matene vizito al la aùto-muzeo en Houthalen
- tagmeze ebleco por malmultekoste manĝi
- posttagmeze : promenado aù sportado (remado, golfludado k.t.p.)
- infanludejo
- en kazo de pluvo disponiĝas grandegaj haloj
- reveno (alveno en Antwerpen) ĉirkaù la 18-a horo.

1) Lunĉpakedoj disponeblaj en la manĝejo super la festsalono.

## ALIĜILO

| | | |
|---|---|---|
| **Aliĝo** (sabato) | — individuo(j) ............ x 100 fr. | ............ |
| | — infano(j) aù studento(j) ............ x 50 fr. | ............ |
| | — familio (gepatroj kaj infanoj) ............ x 200 fr. | ............ |
| **Lunĉo** | (= 3 sandviĉoj kaj kafo), haveblaj sabaton tagmeze kaj vespere ............ x 60 fr. | ............ |
| **Balo** | ............ x 60 fr. | ............ |
| **Aùtoĉar-ekskurso** | (trinkmono enkalkulita) — individuo(j) ............ x 200 fr. | ............ |
| | — infano(j) aù studento(j) ............ x 100 fr. | ............ |
| | — familio (gepatroj + infanoj) ............ x 400 fr. | ............ |
| | Sume : | ............ |

Bonvolu sendi la aliĝilon al S-ro A. LÖDÖR
Brusselse steenweg 385
9001 Gentbrugge
kaj samtempe ĝiri la sumon al lia Pĉk. n-ro 50.08.64.

NOMO : ............................................

ADRESO : ............................................

............................................

Subskribo